

BULTENO

GERMANA
ESPERANTA
FERVOJISTA
ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung
deutscher Eisenbahner-Esperantisten
im Bundesbahn-Sozialwerk



Fondita 1952

Numero 1

Januaro/Februaro 1973

Arhus, la urbo de la 25a IFEF-Kongreso



Arhus estas kun siaj 235.000 loĝantoj la dua urbo de Danlando. Ĝi havas eksterordinare belan situon ĉe la maro kaj fagojn ĉe la suda kaj norda flanko de la urbo.

Laŭ grandeco ankaŭ la haveno estas la dua de la lando; proksimume 10.000 ŝipoj frekventas ĝin ĉiujare por la vartrafiko kun multaj havenurboj de la mondo. Al Oslo ekzistas regula servado per grandaj kaj modernaj pasaĝer- kaj frajtsipoj. La urbo havas viglan komercon kaj ampleksan industrion, kiuj daŭre evoluas, plue multajn vidindaĵojn. La bele situanta universitato estas la plej moderna en Eŭropo. Mondkonata estas „la malnova urbo“, kies 55 antikvaj konstruaĵoj donas tre bonan bildon pri dana urbo kaj metiista kulturo de la 15-a ĝis la 18-a jarcento. La domoj devenas el diversaj urboj de la lando kaj ili estas tre akurate rekonstruitaj en sia originala stilo. Interne ili montras antikvajn meblojn, metiejojn kaj aliajn kolektaĵojn de diversaj epokoj. En la urbestrara domo — unu el la plej belaj kon-

struaĵoj de la urbo — oni povas vidi komercistan butikon de la 18a jarcento. En la plej malnova dana teatro, transportita el la urbo Elsinore, prezentiĝas operoj kaj altnivelaj muzikaĵoj en somero.

Forta kontrasto kun tiuj antikvaj domoj montras la tre modernstila urbodomo de Arhus, finkonstruita en 1941, kiam la urbo festis sian 500-jaran ekzistadon. En la halo oni trovas la originalan urbodokumenton, subskribitan en 1441. Malantaŭ la kastelo Marselsborg — la somera restadejo de la dana reĝino — idilie situas la arbobotnika ĝardeno, unu el la plej belaj parkoj de la urbo. Dum la tuta jaro la parkoj estas multe vizitataj, somere por promenadi kaj sunbani, en la vintro por glitkurado. Por pasigi libertempon Arhus estas vere konvena loko, ĉar ankaŭ ĝiaj ĉirkaŭaĵoj estas belaj. En malgranda distanco troviĝas la feria regiono Mols kun bela, tre dekliva naturo, la konata urbo Silkeborg kun belaj lagoj la mondkonata „Cielmonto“, elorado por ĉiu komencanta montgrimpanto.

Krom la multaj hoteloj ekzistas eblecoj por tranoktado en migrula hejmo kaj en bone instalita tendumejo, situanta en arbaro tuj apud la maro. Ne mirige do, ke Charles Jensen en sia — ĉi tie mallongita — artikolo entuziasme invitas festadi en Arhus la jubilean kongreson de IFEF. Ne prokrastu vian aliĝon; LKK kore bonvenigos vin kiel ankaŭ la afabla loĝantaro de la urbo.

Denken Sie an die Jubiläumsspende für IFEF!

Lesen Sie bitte nochmal den „Aufruf an alle Mitglieder“ im Bulteno 5/1972, Seite 8. Beiträge mit Hinweis auf diesen Zweck bitte überweisen an: Esperanto BSW (GEFA) Sparda Frankfurt/Main, Konto 953 729.

25. IFEF-Kongreso vom 12. bis 18. 5. 1973 in Aarhus/Dänemark.

Anschriŭt: 25. IFEF-kongreso, Tausparken 9, Dk-8230 Aabyhøj. Kongreßbeitrag bis 31. 1. 1973: 76 dkr, danach 96 dkr. Familienangehörige, Ruheständler und Jugendliche bis 20 Jahren bezahlen die Hälfte.

Lastaj informoj el Arhus

Dimanĉon, la 13an de Majo, de 17a ĝis 18a horo prelegos d-ro W. Bormann, Hamburgo, pri „Eŭropa fervoja politiko en la Komuna Markato“. La solena malfermo okazos je la sama tago ek de 10a ĝis 12a horo en la urbodoma halo. La akcepto, flanke de la urbo la 15an de Majo de 19a ĝis 21a horo, estos por ĉiuj kongresanoj. La folkloro vespero pri Gronlando okazos la 17an de Majo je la 20a horo. Gronlandanoj en kolorriĉaj naciaj kostumoj kantos, dancos kaj montros filmojn pri Gronlando. La FISAIC-vesperon partoprenos du orkestroj, uno kanthoro kaj popoldanctrupo kun propra orkestro. Ĉiuj aktoroj estas fervojistoj kaj membroj de FISAIC.

Berichtigung

Bulteno 5/72 Seite 1 links erster Absatz letzte Zeile: „inter niaj fak kolegoj“. Seite 4 rechte Spalte letzte Zeile des Berichtes GEFA en 1972 „antaŭ ĉio propra konvinko“. Seite 6 rechte Spalte 11. Zeile „Ni do ne juĝu tion malhonestan“.

Dezirata korespondi

kaj ŝanĝi neuzitajn poŝtmarkojn, s-ro Ernesto Schlesinger, Cluj-1/Rumanio, Poß 35. La kolektanto estas emerita librotenisto, esperantisto ek de 1927 kaj 63-jaraĝa. Se necese li respondos ankaŭ germanlingve.


Esperanto-veteranoj

La redakcio prezentos al vi regule la portreton de unu el la veteranoj, kiuj grandparte estas ankoraŭ aktivaj en la Esperanto-movado. La distriktkomisiitoj estas petataj sendi siajn kontribuojn kun foto de siaj veteranoj.

La plej maljuna kaj verŝajne malnova el niaj membroj estas

Wilhelm Bulla

naskita la 1an de Oktobro 1884 en Ratibor/Supra-Silezio. En 1906 li dungigis kiel metiisto ĉe la iama Reĝa-Prusa-Fervojadministracio, ek de 1912 li servis kiel laborestro en fervoja riparejo.



Wilhelm Bulla

En 1946 li transloĝiĝis al Recklinghausen, kie li laboris ĝis 1949. 65jaraĝa li emeritiĝis.

En la riparejo Recklinghausen s-ano Bulla aŭdis unuafoje pri Esperanto. La iama distriktestro por Essen, s-ano Josef Waldmann, aranĝis en 1947 kurson por komencantoj. Inter la dek partoprenintoj estis ankaŭ Wilhelm Bulla. En 1952 li vizitis sian unuan IFEF-kongreson en Lindaŭ, poste preskaŭ ĉiujn IFEF-kongresojn kaj GEFA-jarkunvenojn. Kvankam li festis in-

tertempe sian 88-an naskiĝtagon, li partoprenis ĉiujn aranĝojn en sia distrikto Essen kaj planas viziti la jubilean IFEF-kongreson en Arhus kaj en la jaro de sia 90-a naskiĝfesto la IFEF-kongreson en Hispanujo. Li estas membro ne nur de IFEF/GEFA, sed ankaŭ de UEA kaj GEA.

Ni esperas, ke nia ĉiam gaja kaj kontenta kolego restos en bona sanstato tiel longe kiel eble en nia rondo.

„La manipulata homo“

La supra temo estis pritraktata en 8 diskut-grupoj de ne pli ol 10 personoj dum la Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo, kiu okazis apud Darmstadt de la 27-a de decembro 72 ĝis la 3-a de januaro 1973. La gvidantoj de la laborgrupoj estis: G. Bertucci (Italujo), C. Nourmont (Francujo), A. Oberdorfer (Aŭstrujo), V. Ari (Italujo), W. Pilger (Nederlando), J. Pool (Usono), K. E. Salzmann (Germanujo), P. Peeraerts (Belgujo).

Ambasadoro Harry

La aŭstralia ambasadoro en la Federacia Respubliko Germanujo, Ralph Harry, tre aktivis favore al Esperanto.

Okaze de sia vizito ĉe la Unuiĝintaj Nacioj en Novjorko, komence de 1972, li prelegis ĉe publika kunsido de la Esperanto-societo pri la utiligo de la internacia lingvo por diplomatoj.

En majo li prelegis en Silkeborg (Danlando) antaŭ la kongreso de Centra Dana Esperantista Ligo. La 13-an de julio Ambasadoro Harry malfermis Esperantoekspozicion en Zweibrücken kaj prelegis pri Aŭstralio. Dum oficiala akcepto li respondis en Esperanto al urbestraj salutvortoj.

Mitteilungen des Vorstandes

Die Mitglieder des Arbeitsausschusses Esperanto trafen sich in der mit Buletano 5/1972 bekanntgegebenen Besetzung am 9. 12. 1972 zu ihrem ersten Arbeitsgespräch in Koblenz. Tagesordnung und Kongreßvorschläge für den 25. IFEF-Kongreß wurden besprochen. Der 2. Vorsitzende berichtete über den Stand der Vorbereitungen für die 17. GEFA-Jahresversammlung vom 5. bis 7. 10. 1973 in Koblenz. Die Mitwirkung beim UK 1974 in Hamburg ist vorgesehen. Die Prüfungskommission wird ihre Arbeit wieder aufnehmen. Die z. Z. gültigen Prüfungsbedingungen werden an anderer Stelle veröffentlicht. Der Umfang der organisatorischen Änderungen und der Wechsel einiger Bezirksbeauftragter ist auf der letzten Seite dargestellt. Mit der Versetzung unseres Mitarbeiters Otto Rösemann zur BD Hannover hat die GEFA-Zentralbücherei ebenfalls dort einen neuen Platz gefunden. Unsere gut ausgestattete Bücherei enthält viele aktuelle Bücher, die es lohnen entleihen zu werden. Die nächste Besprechung mit den Bezirksbeauftragten und Sonderbeauftragten wird am 31. 3. 1973 in Würzburg stattfinden. Wünsche zur Tagesordnung durch die Bba werden bis zum 18. 3. an den Vorsitzenden erbeten.

IFEF hat „Statuto kaj regularoj“ mit Gültigkeit ab 1. 1. 1973 herausgegeben. Sie werden in begrenzter Anzahl in Kürze an die Bezirksbeauftragten verteilt. Interessenten wollen sich dieserhalb mit ihrem Bba ins Benehmen setzen. Die Anmeldevordrucke für den 25. IFEF-Kongreß sind an die Bba verteilt worden

und können dort angefordert werden.

Nekrologo

Bona amiko forlasis nin por ĉiam. Estas nia hispana emerita kolego José Saladrigas, mortinta jam la 9an de Septembro 1972 en aĝo de 69 jaroj. Li estis ne nur unu el la elstaraj figuroj de nia hispana asocio. Li estis ankaŭ homo, je kies vortoj oni nepre povis fidi kaj kiu neniam seniluziigis siajn amikojn. Neforgesebla restas en ĉies memoro la „kongreso de la floroj“ en Barcelona, kies LKK-on li prezidis. Ankaŭ inter ni germanoj li havis multajn amikojn. Nome de ili mi diras: „Kara José, vi komprenis ĝisfunde la noblan ideon de d-ro Zamenhof kaj ĉiam sekvis ĝin. Ni konservos la memoron pri vi en niaj koroj.“

J. Giessner

El niaj grupoj

Essen/Duisburg. Pli ol cent esperantistoj el Nordrejn-Vestfalio pri kunvenis dimanĉon, la 10 dec 72, por „kultura tago“ kaj Zamenhof-festo. Fakte oni ne faris laŭdajn vortojn Zamenhof, sed oni ekskluzive parolis la Zamenhofan lingvon, kio vere estis la plej efika omaĝo al Zamenhof. Inter la parolantoj troviĝis ankaŭ kelkaj eminentaj esperantistoj, kiel la aŭstralia ambasadoro kaj la ĝenerala sekretario de UEA. La tuta tago, de la 10a ĝis la 20a horo, estis plenigita de riĉenhava, eble tro abunda programo, kiun preparis G. D. Winkler kaj Rolf Terjung.

Willi Brandenburg, GEFA-estrarano por informado kaj varbado, salutis en la nomo de la fervojistoj. Poste s-ino Köhler, Schwelm, montris lumbildojn pri la IFEF-kongreso en Lugano. La posttagmeza programo komenciĝis per prelego de Hartmut Trunte, gvidanto de la E-studrondo ĉe la universitato Bonn.

Pri Portlad kaj la ĉi-jara UK lumbildprelegis Günther Becker, la ĝenerala sekretario de UEA, kiu ankaŭ tuŝis movadajn problemojn. Li akcentis, ke la Portlanda kongreso vere estis tre impresa kaj sukcesa, kaj bedaŭris, ke la kongreso ne trovis la adekvatan informan atenton en la ĉi-landa Esperanto-medio.

Pri „Esperanto kaj Sporto“ prelegis ambasadoro Ralph Harry kaj montris kelkajn mem fotitajn filmojn pri la Munkena Olimpiado, scenojn el la olimpia vilaĝo kaj kelkajn sportajn konkursojn, kiujn li persone komentis. Tiel la ambasadoro fariĝis unu el la unuaj sportaj reporteraj de Esperanto. La preleganto atentigis pri la neceso daŭrigi la sportan agadon en Esperanto kaj bonvenigis la decidon eldoni futbalistan broŝuron en Esperanto okaze de la Mond ĉampionado pri Futbaldo en FRG 1974.

Riĉenhava librostando de Ludwig Pickel trovis multajn rigardantojn kaj same multajn aĉetantojn.

Essen/Dortmund

Die Zusammenkünfte des Esperanto-Kreises finden jede Woche montags von 18 bis 19.30 Uhr im Auslandsinstitut der Stadt Dortmund, Arndtstraße 30 A, statt. Am 9. 10. 72 berichtete G. Bartz über die gemeinsamen Veranstaltungen der belgischen, französischen und deutschen Landesverbände in Clervaux/Luxemburg am 7./8. 10. 72.

Aus den Bezirken

Stuttgart

Vom 23. bis 25. 9. 1972 trafen sich die Stolze-Schrey-Stenographen zu ihrer Jubiläumskonferenz in Stuttgart-Bad Cannstadt. Man feierte den 75. Jahrestag der Begründung des Systems Stolze-Schrey. Unter den Gästen aus der DDR und der Schweiz befanden sich zahlreiche Esperantisten.

Frankfurt/Main

Anfang Oktober 1972 trafen sich die Esperantisten des Rhein-Main-Gebietes zur ROMOLO - Zusammenkunft in Frankfurt/Main. Vorsitzender Bernhard Zenker berichtete über erfolgreiche Initiative junger Esperantisten in Offenbach und Darmstadt. Zur Unterstützung der Aktivität unseres GEFA-Mitgliedes Denk und der dort ansässigen amerikanischen und norwegischen Sprachfreunde Kvasnák und Christoffersen (beide waren in Clervaux) soll die Frühjahrszusammenkunft in Offenbach stattfinden.

Interesa iniciato Nürnberg-Kronach.

Esperanto-rondo Kronach, pri kies fruktodona agado ni jam ofte raportis, lanĉis nun novan ekzemplodonan agadon.

Ili startis kurson pri germana lingvo por gastlaboristoj konsciante, ke la lingva izoleco de la gastlaboristoj nur povas esti nuntempe forigata per la ellernado de la koncerna nacia lingvo, do ĉi tie de la germana.

La loka gazeto „Neue Presse“ publikigis la alvokon al la gastlaboristoj en la koncernaj lingvoj kaj en Esperanto.

Ankaŭ la bavara radio en sia rubrika „Novajoj el Bavario“, sabate, 11 nov 72, raportis pri la iniciato de la Esperanto-rondo Kronach.

Distrikt-komisiito en Köln

Kiel okcidentberlina fervojisto mi estis de 1952 ĝis 1955 sen laboro, kaj dum tiu tempo mi regule vizitis interesajn prelegojn en la universitato Berlin aranĝitajn de la Germana Sindikata Asocio (DGB).

Dum iu vespero sinjoro Dahlmann el Berlin prelegis pri la lingvaj problemoj en Eŭropo. Tie mi aŭdis unuafoje pri la Internacia Lingvo. Hezite mi ja havis sufiĉe da tempo, mi komencis lerni Esperanton en la novfondita grupo „laboro“



Erhard Herlitze

de la DGB sub gvidado de s-ano Kunze, vaste konata en SAT. En la jaro 1955 mi transloĝiĝis al Bonn kaj post la redungo per la fervojo mi volis provi la lernitan scion de Esperanto kaj aliĝis al la Internacia Feriosemajno en Vieno, aranĝita de la ŝatata Hugo Steiner. Jam en la trajno mi renkontiĝis unuafoje eksterlandan esperantiston, kaj post tiu feriosemajno mi estas entuziasma pri la ebleco interkompreniĝi per Esperanto. Mi tuj aliĝis al GEFA kaj ekde nun partoprenis al preskaŭ ĉiuj IFEF - kongresoj kaj GEFA-jarkunvenoj.

En la Esperanto-grupo Bonn mi estis kasisto kaj dum 1959 UEA-delegito por la urbo Bonn.

Nur hezite pro la ŝanĝantaj labortempoj mi transprenis en 1971 de nia kolego Mester la oficon de komisiito por la distrikto Köln. Sed mi volas klopodi veki kaj plivastigi inter fervojistoj kaj fervojaj instancoj la interesecon por Esperanto.

El aliaj landoj

Danlando

Esperanto denove en la dana fervoja horaro. Tiun rimarkindan frazon ni legis en la DEFA-Bulteno n-ro 10/1972. GEFA gratulas pri tiu bona rezulto.

Nova DEFA Esperanto-ekspozicio okazis en Aarhus inter la 9a ĝis 17a de Septembro en la biblioteko Langenaes dum la aarhusa festsemajno. La taggazetoj priparolis la ekspozicion bone.

Italujo

Delegacio de Esperantofervojistoj akceptita ĉe itala ministerio. Dum la interparolo inĝ. Fienga, iama direktoro de la Italaj Ŝtatafervojoj, esplicitate agnoskis la idealan kaj precipe praktikan signifon de la Internacia Lingvo.

Esperantoklubo „Unueco“ Krommenie/Assendelft Nederlando organizos denove de 5 ĝis 12 Aŭgusto 1973, la 19-an Internacian Esperantoferiosemajnon.

Oni gastloĝas senpage, ĉe esperantofamilioj.

Oni nur pagas por la ĉiutagaj ekskursoj 150,—. Ned. guldenoj.

Limdato de aliĝo ĝis 15 Junio 1973.

Informojn prospektojn senpage havebla ĉe:

Esperantoklubo „Unueco“ Krommenie/Assendelft, S-ino J. A. v. d. Meulen, Popelstraat 13, Krommenie, Nederlando.

Internaciaj fervojnovaĵoj

Italio:

En Trieste oni konstruas novan plejparte subteran linion kiu donas al la haveno pli bonan fervojan konekton. La konstruado daŭros 4 jarojn.

La nuna linio al la haveno kondukas tra la centro de la urbo kaj la surstrata trafiko ofte tre malhelpas la fervojtrafikon.

De tempo al tempo okazas ke la trajno al aŭ de la haveno devas atendi dum horoj pro malkorekte parkitaj aŭtoj. La nova linio eliminos tiuj malfacilaĵojn

Norvegio

La plej longa fervojtunelo en Eŭropo norde de la alpoj.

Laŭ la fervojlinio Oslo—Drammen konstruiĝas nova 10,7 km longa tunelo tra la altaĵo inter la stacioj Asker kaj Brakerøya. En Februaro 1963 la laboro komenciĝis de ambaŭ flankoj de la monto. Pro la malbona kvalito de la roko ĝi laŭplane daŭros 7 jarojn, sed iom post iom oni devis rezigni je tiu tempoplano. Argilo ŝvelema miksitaj kun frakasitaj ŝtonamasoj necesigis ampleksajn sekuriglaborojn kaj por ke la krevado okazu sendanĝere kaj pro la konstanta sekurigo de la tunelo por la estonta trajntrafiko.

Dum la tuta laborperiodo okazis geologiaj esploroj laŭ modernaj metodoj kaj ili montris ke estos necese iomete ŝanĝi la direkton de la tunelo per enkonstruado de du kontraŭkurboj. Per tio oni sukcesis pli rapide frakasi tre malfacilan sekcion de la roko. Sammaniere oni evitis enpenetron de akvo en la tunelo de lageto situanta sur la altaĵo super la tunelo.

La profilo de la tunelo mezuras 60,5 m. Ĝi estas 6,5

metrojn alta kaj 9 metrojn larga.

El Norvega Esperantisto

Laboratorio sur reloj

La aŭstraj Simmering-Graz-Pauker-fabrikaj liveris al la Germana Regna Fervojo trakesplorvagonon ekipitan per la plej modernaj elektronikaj instrumentoj. La veturilo, longa preskaŭ 27 metrojn, estas rigardata kiel la plej moderna de sia speco en la mondo kaj kiel la plej multekosta fervojvagono konstruita iam en Aŭstrio. Ĝi kostis dudek milionojn da ŝilingoj.

Tasko de la trak-esplorvagono estas kontroli la relvojan surkonstruaĵon. La instrumentoj instalitaj en plene klimatigita kupeo funkcias dum rapideco de 160 km/h kun nur 2% je eraroj.

Entute 16 diversaj mezuritaj indikoj estas fiksataj, krome du specifaj datiloj permesas ankaŭ la prezenton de kombinitaj indikoj. La Germana Federacia Fervojo posedas depost jaroj simile modernan trak-esplorvagonon; ankaŭ la Aŭstraj Federaciaj Fervojoj eluzas tian veturilon, kiu estas konstruita el iama salonvagono kiel rulanta trak-esplorvagono.

Traduk. de W. B.
el „Rad und Schiene“

Nova magistralo de nordo al sudo tra Eŭropo

Kun granda energio estas nuntempe propagandata, precipe en Svislando, la projekto de nova fervoja interligo tra la Alpoj en orienta Svislando. Tiu nova linio tra la Alpoj estos konstruata, kiam laŭ la koncepto de la Svisa Federacia Konsilantaro estos efektivigita la baza gothard-linio kaj finkonstruota la fervojo de la Lötsch-monto. Kiam realiĝos tiu projekto, ne

estas rekoneble ankoraŭ nun.

Antaŭ nelonge reprezentanto de la Svisa Federacia Konsilantaro renkontis en München la germanan federacian ministron por trafiko. Partoprenis ankaŭ reprezentantoj de la Svisa Oficejo por Trafiko kaj de la Svisaj Federaciaj Fervojoj. La germanaj partoprenintoj konfirmis sian konsenton pri la projekto de la Svisa Federacia Konsilantaro rilate al la konstruataj magistraloj kaj certigis sian subtenon por konstrui novan orientan linion.

Tiu linio en orienta Svislando kondiĉus konformajn aliĝtrakojn de la Germana Federacia Fervojo en la nordo kaj de la Italaj Ŝtatfervojoj en la sudo. La novkonstruota magistralo estus grava per tio ne nur por la alpa regiono, sed kiel sendependa eŭropa koridoro de nordo al sudo ankaŭ por grandaj teritorioj.

Traduk. de W. B.

Per fervojo al Teheran Rekta fervoja interligo Eŭropo-Irano pramŝipoj trans Bosporo

De aŭtuno de la pasinta jaro varvagonoj el Eŭropo povas ruli tra distanco de pli ol 6000 kilometroj ĝis Irano. La 27an de Septembro 1971 renkontiĝis en la turka urbo Van sur la orienta bordo de la Van-lago la turka ministroprezidento kaj la Ŝaho de Persujo, por malfermi la novan linion, ligan la iranajn kun la turkajn fervoja reto. La unua rekte ekspedita varvagono rulis tra 5700 kilometroj de Hamburgo al Teherano kaj bezonis 18 tagojn.

Post kiam la Iranaj Fervojoj (RAI) aliĝis al la RIV-konvencio pri interŝanĝo de varvagonoj kaj al la Internacia Konvencio pri la Fervoja Frajtrafiko (CIM), varvagonoj povas esti sen-

dataj per internacia frajletero de ĉiuj eŭropaj stacioj al ekzemple Teherano. Cetere oni estas konstruanta en Irano novan linion laŭ normala ŝpuro (1435 mm) en la direkto al Pakistano. Post malmultaj jaroj la linio atingos en la urbo Zahedan la pakistan-hindan reton kun la ŝpuro de 1676 mm. En Hindio oni jam parolas pri transkontenera trafiko al Eŭropo.

Ekrakte tradukita el
„Rad und Schiene 7/72“
de J. Gießner

Feriosemajno en Nederlando

La feriosemajno okazis inter la 9a kaj 16a de Septembro 1972 en Wijk aan Zee/Nederlando. Tie kunvenis vere internacia grupo en la belega hotelo Kennemerduin.

Per aŭtobuso kaj trajno mi partoprenis ĉiutage bonege organizitajn ekskursojn al interesaj lokoj. Mi staris sur granda digo, finkonstruita en 1932, kaj estis en Den Helder por viziti la havenon. Mi promenis en la ĉirkaŭejo de Zaan, kie troviĝas ankoraŭ dudek muzeiloj. En la 18a jarcento pli ol 700 ventmueleloj funkciis por produkti oleon, paperon, tolon kaj kolorojn. Aliaj mueleloj estis uzitaj por sekigi la grundon aŭ por segi la arbotrunkojn, kiujn oni bezonis por la konstruo de domoj kaj ŝipoj. Eĉ la caro Petro la Granda lernis en 1697 tie la metion de la ŝipkonstruado. Alia interesa celo estis „Schiphol“, la haveno de Amsterdam, kaj Aalsmer. Dum tiu tempo okazis en Aalsmer la floraŭkcio, laŭdire la plej granda de la mondo. La vizitita Alkmaar estas konata kiel urbo de la fromaĝo. Somere estas aŭkcio ĉiuvendrede sur granda placo. Blankvestitaj fromaĝportistoj laboras

tie. Po du laboristoj portas la 160 kg pezajn fromaĝojn. La korporacio de portistoj ekzistas jam de pli ol 350 jaroj.

En Den Haag mi vizitis la „Panorama Mesdag“. Tio estas la plej granda panorama pentraĵo de la mondo pentrita en la jaro 1880. La lastan tagon mi faris rondvojaĝon per ŝipo en Amsterdam. La malnovaj domoj estas konstruitaj dum la „bona periodo“, kiam Amsterdam posedis la plej grandan havenon de Nederlando. Pro tio, ke en Amsterdam loĝejoj konstante mankas, multaj homoj vivas en loĝigitaj ŝipoj, sed nur 1000 personoj havas la oficialan permeson eluzi tian ŝipon.

En Amsterdam la partoprenintoj adiaŭis. Mi estas tre dankema al s-ro Blaaw el Zwolle pro la bonege organizita feriosemajno. La tago en Nederlando estos neforgeseblaj. Käthe Merlitz

Britische Parlamentarier für Esperanto

Eine Umfrage des britischen Esperanto-Bundes, die 100 britische Parlamentarier umfaßte, ergab, daß 45 Parlamentarier Esperanto als Internationale Sprache befürworteten. 14 Befragte waren dagegen oder traten für Englisch als Internationale Sprache ein. 13 waren nicht gegen Esperanto, und 28 Parlamentarier äußerten keine Meinung. Acht der befragten Parlamentarier lernten Esperanto, einschl. Oppositionsführer Wilson. Auch George Thomson, der frühere britische EWG-Minister und designierter Vertreter in Brüssel für Großbritannien, sprach sich positiv für Esperanto aus. Ein Großteil der Parlamentarier bedauerte die stiefmütterliche Behandlung des Esperanto im Schulunterricht und in den Massenmedien.

SAT - Kongreso 1973

La 46-a Kongreso de SAT okazos de la 30. 7. — 6. 8. 1973 en la kanada urbo Toronto. Invitas la SAT-Rondo de Toronto sub la adreso: Esperanto, P. O. Box 246, Station „F“, Toronto, Ontario, Kanado.

Wir veröffentlichen nachstehend ein Schreiben des Hauptvorstandes der GdED an die Eisenbahner Esperanto-Gruppe Hagen. Der unterzeichnende Kollege Smuda fand als Vertreter der GdED im Rahmen der Jahresversammlung in Clerveaux treffende und ermunternde Worte über unsere Arbeit. Er beantwortete das Schreiben unseres Kollegen Hermanns vom 8. 11. 1972.

„Lieber Kollege Hermanns!

Zunächst bitte ich um Nachsicht, daß ich infolge längerer Abwesenheit erst heute dazu komme, auf Dein Schreiben zu antworten.

Ich habe von dem Inhalt mit großem Interesse Kenntnis genommen und mich sehr darüber gefreut. Deiner Anregung entsprechend werde ich Gelegenheit nehmen, anlässlich der nächsten Sitzung unserer Hauptjugendleitung Deinen Vorschlag zu unterbreiten. Auch ich vertrete den Standpunkt, daß es im Interesse der Organisation und zur Unterstützung unserer völkerverbindenden gemeinsamen Arbeit sehr dienlich wäre, wenn auch in unserer Jugendarbeit ESPERANTO mehr Beachtung finden würde.

Ich würde es sehr begrüßen, wenn auch Du auf Bezirksebene in dieser Richtung bei dem Bezirksjugendleiter unserer Organisation ebenfalls aktiv wärst.

Mit freundlichen Grüßen!
gez. Smuda“

Namen und Ereignisse

Der dänische Außenminister, K. B. Andersen, lud den Vorsitzenden des Dänischen Esperanto-Verbandes, Ib Schleicher, zu einem Gespräch über die Arbeit für Esperanto und das Interesse für das internationale Sprachenproblem nach den Sommerferien ein. In dem Schreiben stellte der Minister fest, daß diese Angelegenheit viel Aufmerksamkeit verdiene und deren Behandlung in internationalen Organisationen wie UN und UNESCO er sehr genau verfolge.

Vom 22.—29. Juli 1972 fand in Wien im Rahmen einer Esperanto - Europa - Konferenz das „Erste Esperanto-Filmfestival“ statt. Veranstalter war die Österreichische Esperanto-Bewegung. In einem Seminar in Frostavallen, Schweden, über das Problem der sprachlichen Kommunikation in der modernen Welt — mit besonderer Berücksichtigung der Situation in Europa — diskutierten 105 Teilnehmer aus 13 Ländern 15 Berichte über die Stellung der Sprachen in internationalen Institutionen, über die Strukturen und die Verbreitung der englischen, französischen, deutschen, russischen und internationalen Sprache und über die Sprachpolitik der großen und mittleren Mächte. Das Seminar kam zu der Schlußfolgerung, daß nur das neutrale Esperanto für die internationale Kommunikation brauchbar sei.

Bei der Eröffnung der Esperanto-Ausstellung anlässlich des 50. Deutschen Esperanto-Kongresses in Braunschweig erklärte der australische Botschafter in Bonn, Ralph L. Harry, Esperanto sei eine lebende Sprache, es fungiere als internationale Sprache, Esperanto sei modern, aktuell!

Dieser Tage wurde in Frankreich der 20. Gründungstag des Esperanto-Kulturhauses Schloß Gresillon in Anwesenheit von Esperantofreunden aus 10 Ländern begangen. In diesen 20 Jahren weilten mehr als 10 000 Esperantisten aus aller Welt innerhalb der Mauern des Schlosses. Bei der Jubiläumsfeier lud Frau Elsbet Wielgus, Vorsitzende der Esperanto - Gesellschaft Hamburg, zum 59. Esperanto-Weltkongreß in Hamburg 1974 ein.

Der österreichische Bundespräsident Franz Jonas lud bei seinem Staatsbesuch in Frankreich zu einem Empfang in Paris auch eine Delegation des Französischen Esperanto-Bundes ein. Sein fließendes Esperanto erregte allgemeine Aufmerksamkeit. aus „Esperanto aktuell“

Juna kolego, Esperantisto el Karl-Marx-Stadt (Chemnitz) skribis al ni la jenan: „Mia patrino estas 70-jaraĝa. Ŝi estas tre diligenta, bonhumora, povas ankoraŭ bone piedmarŝi, kapablas labori kaj faras ĉion, kio necesas.

Ŝia granda deziro estas unufoje ankoraŭ viziti la okcidentan parton de Germanio. Sed tio nur eblas, se iu pretas inviti ŝin. Ni mem ne havas parencojn tie. Volonte ŝi helpas ĉe tia familio. Monon ŝi ne bezonas.“

Ĉu iu el niaj membroj estas preta, inviti kaj akcepti la virinon por 2 semajnoj? La tempon vi mem povos fiksi. Estas egale, ĉu en printempo, somero aŭ aŭtuno. Estus bonvola gesto de reciproka estimio.

Pro detalaj informoj bonvolu interilati kun la sekretariino S-ino E. Kruse, Bundesbahn-Sozialamt, 6 Frankfurt/Main, Karlstraße 4-6, dejora telefon-nr. 9 55/32 80

Esperanto-Sportführer für Fußballer

Aus Anlaß der Fußballweltmeisterschaft 1974 bereitet die Esperanto-Bewegung einen mehrsprachigen Esperanto-Sprachführer für Fußballer vor. Schon zur Olympiade in München erschien ein allgemeiner Sport-Sprachführer in Esperanto.

Der 59. Kongreß der Universala Esperanto Asocio findet vom 27. 7. bis 3. 8. 1974 in dem bis zu diesem Zeitpunkt eröffneten modernen Kongreß-Zentrum in Hamburg statt.

GEFA-Jahresversammlung 1973

vom 5. bis 7. 10. 1973 in Koblenz — Bezirk Köln —.

Skolta kunveno en Bregenz

Dum la unuaj du semajnoj de julio 1973 okazos en monta kabano en Bregenz (Aŭstrujo) renkontiĝo por skoltoj (ek de 16 jaroj), kiuj almenaŭ scipovas la enhavon de la „Jamborea Lingvo“. Gvidos Franz Schwörzler. Kostoj por loĝi kaj manĝi ĉ. 7 GM tage.

Vigla agado en Neustadt/Weinstraße

La 16. 12. 1972 komenciĝis en la instruĉambro de la Germana Fervojo nova Esperanto-kurso, organizata de la Junulara Grupo de la Sindikato de la Fervojistoj en Germanujo (GdED) kadre de BSW Karlsruhe. — La Esperanto-Centro Neustadt regule dissendas al instruistoj, lernejoj kaj aliaj instancoj informojn pri Esperanto, i. a. ankaŭ la germanlingvan informilon „Esperanto aktuell“.

Redaktfino por n-ro 2/1973 estas la 25. 3. 1973

**Estraro kaj komisiitoj de la unuigo Germana Esperanto Fervojista Asocio
en la Sociala Organizo de Germana Federacia Fervojoj
Stato: Januaro 1973**

Estraro

Prezidanto: BAmtm Gießner, Bf Herzberg (Harz); Basa 949/887/391

Vicprezidanto/Redaktoro: BAmtm Graß, BD Köln - F-Büro, F 60 -; Basa 943/1242, privata adreso: 565 Solingen 11, Meteorstr. 13

Sekretarino: BHS'in Kruse, Sozialamt Frankfurt/Main; AA 517; Basa 955/3280

Varbado/Informado: TBOI Brandenburg, Hbm Münster, (Westf.); Basa 945/397 aŭ 1391

Kasisto: BHS a. D. Jentsch, Bf Ober-Ramstadt ĉe Darmstadt

Apartaj komisiitoj

Lingvaj ekzamenoj: BOAR Dr. Lang, Pa bei der BD Frankfurt/Main; Basa 955/1501

Instruado: BOAmtm a. D. Jäger, 6 Frankfurt/Main, Felix-Dahn-Str. 6; poŝttelefono 515123

Fakterminaroj: BOAmtm Ritterspach, ZVL Frankfurt/Main, AA 5412; Basa 955/7538

Junularaferoj: BS Heimlich, Ga Soltau (Hannover); Basa 949/850/113

Biblioteko kaj gazetkolektado: BOI Rösemann, BD

Hannover, Bf 34; Basa 949/2378

Bulteno-dissendo: BOS Schindler, Bf Schwelm (Wuppertal); Basa 946/848/126

Arkivo: BOS Barmaneter, Bf Woringen (Schwaben) - über Memmingen - Bez. München; Basa 964/824/365

Distriktkomisiitoj

Essen: BOAmtm Schnetzer, Bf Hamm (Westf.); Basa 944/807/391

Frankfurt/Main: BOAR Dr. Lang, Pa bei der BD Frankfurt/Main; Basa 955/1501 aŭ 5788

Hamburg: BOAmtm Lepke, BD Hamburg - B-Büro -; Basa 947/1581 aŭ 5569

Hannover: BHS Heimlich, Bm Soltau; Basa 949/850/127

Karlsruhe: BOAmtm Hug, BD Karlsruhe - Ps-Büro Ps 26; Basa 953/5005

Kassel: BHS Tasler, BD Kassel - Ps-Büro Ps 82 -; Basa 957/1259

Köln: BOI Herlitze, BD Köln, Büro B (Ozl); Basa 943/473

München: Hdw Weidacher, Bw München-Ost; Basa 962/834/553 aŭ 566

Münster: BAmtm Schrupp, BD Münster (Westf.) - P-Büro - P 6; Basa 945/1771

Calwer Str. 19, D-7261 Gechingen.

el „Heroldo de Esperanto“

**Turismaj prospektoj
Beograd, Jugoslavio.** Kolora Esperantlingva faldprospekto pri la venontjara kongresurbo. Eld. Turistoficejo, Moše Pijade 1, Beograd.

Nürnberg: BHS Müller, Bahnpolizeiwache Bamberg, Bp-Posten Lichtenfels; Basa 966/844/388

Regensburg: TBAmtm Röder, BD Regensburg - T-Büro - Th 8; Basa 965/5858

Saarbrücken: BHS Müller, Ps-Büro; Basa 956/1492

Stuttgart: TBAmtm Krüger, Masch.-Amt Heilbronn; Basa 952/822/221

Wuppertal: BAmtm Graß, BD Köln - F-Büro, F 60; Basa 943/1242

**Peto al la eksterlandaj
geamikoj!**

Ĉi maldekstre ni komunikas la aktualan adresaron de la GEFA-estranaroj kaj de la distrikta komisiitoj. Bonvolu korekti vian liston kaj eventuale ŝanĝi la preparitajn adresojn por garantii la akuratan akcepton. Se vi mem havas dezirojn rilate la akcepton de nia BULTENO, ni urĝe petas informi nian sekretarinon.

Informo

S-ro Odd Kolbrek, Oslo 9, Kaldbakkstubben 22 estas redaktoro de la fervojista paĝo en la periodaĵo „Norvega Esperantisto“. Li petas GEFA-anojn sendi artikolo(j)n pri fervoja temo. Ni petas tre kore subteni nian norvegan kolegon.

Anonco

Tutkore ni dankas pro ĉiuj salutoj kaj bondeziroj, kiuj atingis nin, ĉefe la redakcion, okaze de la pasintaj festotagoj. Germana Esperanto Fervojista Asocio.

Herausgeber / eldonanto: Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks, Frankfurt (Main). Schriftleitung / redakcio: Wilhelm Graß, 565 Solingen 11, Meteorstraße 13. Druck / preso: Fränkische Verlagsanstalt und Buchdruckerei GmbH, 8500 Nürnberg. Der Bezug ist für Mitglieder der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten kostenlos. La abono estas senkosta por membroj de la Germana Esperanto Fervojista Asocio.